



la juna vivo

OCTOBRO 1945

MONATA ORGANO DE TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

VERA ESPERANTISTO.

Esperantujo bezonas verajn Esperantistojn same kiel diversaj nacioj bezonas verajn civitanojn.

Vera Esperantisto distingiĝas de la Duon-Esperantisto per sia amo kaj sindono al la movado.

Vera Esperantisto estas konvinkita idealisto.

Li perfekte scias la fundamenton de la lingvo kaj firme ĝin tenas kaj ne atentis la susurojn pri la reformo.

Li uzas Esperanton en ĉiuj okazoj. Li legas Esperantajn librojn kaj abonas Esperantajn gazetojn, oficialajn aŭ kulturajn. Li aliĝas al la Esperantaj organizoj kaj partoprenas Esperantajn kongresojn por praktiki la lingvon kaj progresigi la aferon. Li korespondas kun la samideanoj de aliaj landoj per Esperanto por akiri informojn utilajn kaj sciojn, kaj por kreskigi la fratecon kaj amikecon inter la samideanoj diverslandaj.

Vera Esperantisto neniam forgesas disvastigi la lingvon. Li parolas pri Esperanto dum la konversacioj kun amikoj. Li diskonigas Esperanton en la kluboj kaj asocioj kies membro li estas. Li verkas artikolojn pri Esperanto en la lokaj aŭ naciaj gazetoj, se li povas; li disdonas Esperantajn flugfoliojn kaj propagandilojn inter la konatuloj. Ĉiam kaj ĉie, li diligente kaj diskrete semas la ideon pri la mondlingvo.

Vera Esperantisto kondukas laŭ la spirito de la „interna ideo“ de la Universala Harmonio kaj interpopola fratiĝo. Lia patriotismo Esperantista estas Homaranismo. Li ne celas propran profiton nek disputas pri la bagateloj. Li volonte oferas sian tempon, monon kaj energion al la movado. Kaj li kredas je la fina triumfo de Esperanto.

Verkita de Pastro J. B. Kao.

Julio 1944, New York.

PASTRO KAO EN SUD-AMERIKO.

La eminenta ĉina Esperantisto, Pastro D-ro J. B. Kao, O.F.M., prenigis aeroplanon je la 20-a de Novembro pasinta por flugi al Venezuelo kaj al 17 aliaj landoj de Suda Ameriko. Lia vojaĝo daŭros ok monatojn. La ĉina registaro faris lin Membro de la Ĉina Helpa Komitato por militviktimoj.

Pastro Kao fariĝis Esperantisto en Ĉinujo en 1926. En 1930 li iris al Eŭropo por studi en Romo, Italujo, kaj Francujo, kie li doktoriĝis. En 1938 li venis al Usono.

Li ofte atentigis pri Esperanto en siaj paroladoj, intervjuoj kun ĵurnalistoj, kaj artikoloj. Li parolas multajn lingvojn, ne nur la ĉinan kaj la anglan, sed ankaŭ la italan, la francan, la hispanan, la portugalan, la latinan kaj la rusan.

Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi homojn, el kiuj unuj rigardas la aliajn kiel ratajn mastrojn super la aliaj.

La celado de ĉiuj homoj devas esti krei harmonian homaron.

Generale sufiĉas, ke homo parolu aplombe, senhezite kaj certatone, por ke granda plimulto konsentu kun la diroj de la parolanto kaj eĉ aplaŭdu lin.

Ni kontraŭbatalu tiun malindan kutimon per ĉiuj rimedoj.

(Dr. Zamenhof)

NIA TUTMONDA FAMILIO.

Jes, kiel vi bone divenis, nia grupo konsistas nur el gejunuloj. Ni komencis nian laboron meze de la ĵusfinita milito kaj klopodis iom malfacile ĝis nun, ĉar ni estis izolitaj, sen novaĵoj pri la Esperanto-movado en aliaj partoj de la lando kaj en la tutmondo. Kelkaj el ni eĉ kredis ke la movado ne plu kreskos. Tamen, ni daŭrigis pro la agrableco de la kunvenoj. Sed nun, iom post iom, ni sentas ke nia laboro ne estis vana; kontraŭe, ĉiu el ni ĝojas pri sia persistemo, vidante ke la movado daŭrigas sian idealan entreprenon.

Ni atente legis la T.J.O.-an celon, kaj ĝi kontentigas nin. Certe, por ni, la plej grava punkto estas la antaŭlasta: Havigi al la junularo indan vivocelon, nome interfratigi la homojn per Esperanto. Ni bone komprenas ke Esperanto nur estas ilo por plej granda idealo, pli da amo inter la homoj, dank'al pli da interkompreniĝo.

Braine-le-Château (Belg.)

P. Cullus, 17 jara.

Mi trovis jam en Francio helpantojn en diversaj regionoj, kaj mi trovos ankoraŭ, kompreneble etas tro granda laboro por mi sola fari ĉion. Mi serĉas dividi la taskojn inter fervoraj anoj.

Persone mi intencas prizorgi la propagandan aferon: skribi artikoletojn, cirkulerojn kaj disdoni ilin. Mi esperas varbi multajn TJOanojn dum la lastaj monatoj de 1945 kaj multajn por 1946.

(Marcelle; Francio).

Por subteni la laboron de TJO en Belgio mi volonte iĝas ĉefperanto. Mi do atendas la liston de la nunaj TJOanoj kaj legantoj de la Juna Vivo, kiuj estas en Belgio. Jam mi vidas la vojon por varbi novajn perantojn kaj starigi novajn junular-grupojn. En Blankenberge, Nieuwpoort kaj Brugge naskiĝos TJO ĉeloj. Mi klopodas, ke baldaŭ en mia lando estu vigla esperantista junularo. Baldaŭ mi sendos pliajn novaĵojn.

(Carlos Braet; Belgio).

Hieraŭ mi elserĉis ekzempleron de ĉiuj ĝis nunaj Britaj TJO bultenoj, jaraj raporto, libroj, listoj k.t.p. por sendi al vi tuj kiam oni permesos la sendadon. Estis interese denove legi kion mi skribis dum tiuj unuaj jaroj post la invado de Nederlando — mi apenaŭ povas kredi, ke jam forpasis tiom de jaroj, — ŝajnas nun, ke mi nur daŭre skribis al vi post la sukcesa Tervura kunveno.

(John, Holland; Anglio).

Dum la lasta tempo mi estis tre okupata skribante esp. leterojn kaj prizorgante Esperanto-angulon en „Der Naturfreund” organo de la laborista turismo. Jam de longe mi klopodas tie propagandi Esperanton, kaj nun la unuaj sukcesoj montriĝas. Aliaj fojon mi daŭrigos.

(Walter Kobelt; Svisio).

Mi estas devigata ĉesi la laboron por la nederlandaj infanoj ĉijare, ĉar la dana ministro malpermesis la eniron por pli ol 2000 inf., kiuj jam venis, sed li promesis, ke poste ni eble akiros permeson, kiam la trafikcirkonstancoj estos pli favoraj.

Mi ĝoje atendas „La Juna Vivo”. Ĉi tie la instruado ne estis malpermesita, sed la intereso estis aliloke, nun ni atendas grandan kreskadon de la movado.

(Lisket Grönborg; Danio).

Kompreneble ni volonte helpas al vi pri varbado k.t.p. Tamen, kiel vi scias, la valutaj cirkonstancoj estas tre malfacilaj, kaj povizore ne estas eble transsendi monon. Sed espereble tio baldaŭ ŝanĝiĝos.

Ni deziras al vi sukceson kaj prosperon.

(Arnfinn, Jensson, vicper, Norvega, Esp. Ligo).

En 1936 mi libertempis en la Esperanto-Domo en Arnhem. Inter la gastoj estis nederlandanoj, Ges. roj Melio et Alkmaar. Post tre feliĉa semajno ĉiuj revenis hejmen, kaj dum la sekvintaj monatoj interŝanĝis leterojn, fotografajojn, ktp. En 1938 okazis la junulara tendaro en Groet Mi eltrovis, ke Groet situas nur 8 mejlojn de Alkmaar, do, mi sciigas miajn geamikojn, kaj petis renkontiĝon. Malfeliĉe ili jam aranĝis sian libertempon en Svisujo por precize la sama semajno, do ili ne estos hejme.

„Sed”, ili diris, „via tendaro finiĝos merkredon, ni revenos sabaton. Forsendu la infanojn hejmen(!), iru al Alkmaar, kaj tie vi ricevos de unu el niaj amikoj la ŝlosilon de nia domo — loĝu en la domo — sed manĝu en restoracio, kaj kiam ni revenos ni pagos ĉiujn kostojn al restoracio, kaj poste ni ĝojos gastigi vin dum tuta monato.”

Kompreneble, kiel gvidantino mi respondecis pri la sendanĝera reveno de la infanoj, do mi ne povis akcepti la bonkoran proponon de miaj geamikoj, sed mi ĉiam trezoras ĉi tiun esprimon de la spirito de Esperanto.

Fino N. Rees, Kimrujo.

Mi intencas sendi al la TJOanoj en Leeuwarden etan resumon de la kunveno en Limmen kun la demando, ĉu estas eble ankaŭ ĉi tie aranĝi ion tian.

Vendrede la 28an de Sept., ni havis klubkunvenon de F.E.R. kaj tie ni decidis aranĝi kursojn por TJO. Baldaŭ ni kunvenos por detale pritrakti niajn planojn. (Lies v. d. Wetering).

..... Multe mi ĝojis, ree aŭdi ion el la okcidento, precipe, ĉar ĝi venis de TJO, al kiu mi, malgraŭ la fakto ke mi estas katolika, kaj ankaŭ ano de katolika asocio, multe simpatias.

..... Pasintan dimanĉon mi biciklis de Heemskerk al Eindhoven. Kiam mi en Vugt kviete sidis, formanĝinte mian panon, alproksimiĝis juna viro. Li demandis, ĉu mi parolas Esperanton. Post momento ni interparolis, kaj li rakontis, ke li venis el Leeuwarden. Miavice mi rakontis, ke mi venis de Heemskerk, sed mi havas konatojn en Frislando. Fine montriĝis, ke li tre bone konas miajn amikojn en Frislando, kaj ke mi konas liajn en Limmen, West-Grafdijk kaj Koedijk. ... Jen ree ekzemplo, kiom belegan ligon faras Esperanto. G. J. v. d. Maat.

..... En la pasinta vintro mi ekkonis Esperanton kaj en mallonga tempo lernis ĝin. La „subakviĝuloj-periodo” (dummilita kaŝado de junuloj), kiu ĝenerale kaŭzis multan ĉagrenon, al mi almenaŭ havigis la feliĉon, ke mi liberiĝis kun Esperanto en la koro kaj en la kapo. Estas mia firma intenco estonte fari ĉion, kion mi povos, por helpi en la konstruado de la paco. Kun granda ĝojo mi tial ekkonis la planojn de TJO F. de Boer.

T.J.O. KOMUNIKOJ.

T.J.O. kunveno en Heilo la 11an de Nov. je la deka matene en salono de „De Rustende Jager”. Matene liberaj diskutoj pri „La Petskribo rilate Esp. en la lernejoj”, „Generala Propagando”, „La Juna Vivo”. Cetere kantado, deklamado kaj muziko. Ni petas ĉies helpon ĉe la prizorgo de la programo. Posttagmeze ni faras promenadon en la belegaj arbaroj. Kiu deziras tranokti, menciu tion kiel eble plej haldaŭ al S. de Geus, Zevenhuizerlaan 32a Heilo.

La 23an de Septembro okazis T.J.O. kunveno en Limmen. Partoprenis proksimume 70 anoj. Sro Bant parolis pri: Unueco en la Esperanto movado. Li opiniis ke T.J.O. fakte ne estas junular-organizo. Estas dezirinde, ke ni fiksu aĝon je kiu la membroj devas forlasi la organizon. Nur kelkaj plenaĝuloj restu por doni konsilojn al la junuloj.

Sekvis vigla debato. Kelkaj subskribis la deziron ke la plenaĝuloj aliĝu al alia organizo, ekzemple L.E.E.N., F.L.E. k.t.p. Aliaj preferas „duan etaĝon” por T.J.O. subtenantoj. La kunveno kompreneble ne rajtas decidi rilate tiun punkton. La aferon oni denove pritraktos en inter-nacia kunveno.

Pri dua temo prelegis Sro Uitenboogaard nome pri Esperanto en la lernejo. La prelego estis tre interesa kaj multaj anoj partoprenis en la diskuto.

Posttagmeze estis kunveno ankaŭ por ne-Esperantistoj. La tuta salono estis plen-plena de gejunuloj el Limmen, al kiuj oni montris la filmojn pri la internaciaj kunvenoj en Groet kaj Tervueren. La ĉiam diligenta grupo La Kampfloroj el West-Grafdijk ornamis la feston per kantado, muziko kaj deklamado. La rezulto estis ke 25 infanoj anoncis sin por Esperanto-kurso.

MIA HUNDO

Mi havas hundon, kiun mi nomas „Amiko”. Li estas fos-hundo, kaj baldaŭ estos bona gard-hundo. Li estas preskaŭ tute blanka escepte de tri nigraj makuloj sur lia dorso. Lia kapo estas nigra kaj bruna.

De kiam mi ricevis lin, mi parolis al li en Esperanto. Li komprenas ĉion, kion mi diras al li, kvankam li ne ĉiam obeas. Kiam ni eniras en la aŭtomobilon, li ĉiam estas la unua por eniri. Li tre ŝatas rigardi tra la fenestro apud mia patrino.

En la mateno, kiam ni leviĝas, li estas tre ĝoja vidi nin, kaj saltas tre alte. Li scias kie liaj biskvitoj estas, kaj kiam ni prenas ilin, li saltas apud la skatolo.

Unu el liaj plej valoraj posedaĵoj estas malnova pantoflo, kiun ni donas al li. Li ŝatas skuadi ĝin tre forte. Post ĉiu manĝo li volas sidi sur la genuoj de unu membro de nia familio. Post la vespermanĝo li estas tre kvieta kaj dormema, kaj volas dormi apud la persono, kiu faras plej komfortan kusenon por li, kaj li ŝatas tuŝi iun dum li dormas.

Unu el liaj preferataj pastempoj estas ludi pilkon kun mia fratino Lilio kaj mi mem. Alia estas tre granda ĝojo por li, tio estas forkuri, por ke ni kaptu lin. Li estas tiom rapida kaj ruza, ke neniu povas kapti lin. Ni tre amas nian hundon „Amiko”, kaj esperas ke li vivos longe.

Los Angeles, U.S.A.

Dianto Chomette (13 jara).

LA VIZIO.

Fantomo vizitis min kaj kondukis min al Polujo. Estis antaŭ kvindek jaroj. D.ro Zamenhof laboras pri la lingvo Esperanto. Dum la fantomo kaj mi rigardis lin, Pola Judo venas en la ĉambron kaj diras: „Kial vi laboras pri la lingvo kiun neniu lernas?” D.ro Zamenhof rigardas lin kaj kun rideto respondas: „Homoj en la tuta mondo lernos Esperanton kaj portos verdan stelon.”

La antaŭaj tagoj forpasis. Estas la nuna tempo. La fantomo kaj mi rigardas junajn knabojn kaj knabinojn, kiuj lernis la lingvon Esperanto. La instruistino diras al ili: „Bonan tagon, knaboj kaj knabinoj.” La infanoj respondas feliĉe: „Bonan tagon, Fraulino.” La infanoj silente laboras, kaj skribas Esperanton. Ili diras, ke la Esperanta lingvo estas tre facila kaj tre interesa.

La nunaj tagoj forpasis. Estas la estonteco. La fantomo kaj mi rigardas la virojn kaj virinojn de morgaŭ. Ni estas en fremda lando. La homoj paroladas en Esperanto al homoj el aliaj landoj. Ili estas tre feliĉaj, ĉar ili povas kompreni unu la aliajn. Ŝajnas, ke la tuta mondo parolas Esperanton.

..... Mi vekiĝis kaj trovis min en mia litĉambro. La fantomo malaperis. Mi sonĝis la tutan aferon. Tamen, mi tre deziras, ke mia sonĝo fariĝos vera, por ke la homoj en la mondo estu feliĉaj.

(Verkita de Freda Harris, 14-jara, Anglio).

KIEN SENDI MONON?

Britio: F-ino N. Rees, Derwijdd, Seven Sisters, Neath, Glam.

Jarkotizo TJO, enkl. La Juna Vivo: 4 ŝ. (nur ab. je LJV 2½ ŝ)

Francio: S-ino M. Turin, Trépot, Doubs, Jarkotizo 50 fr. fr. (nur LJV 30 fr.)

Nederlando: TJO-Centro West-Graftdijk, Jarkotizo f 2,50 (ab. LJV 1,50).

Belgio: S-ro C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, Jarkotizo 40 B. fr. (nur LJV 24 fr.)

Tiujn, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, ni urĝe petas: Faru tion baldaŭ.

Redakcio: E. van Veenendaal—Bouwes, Limmen, Ned. / Administrado:
T. J. O. Centro, West Graftdijk N.H., Ned., ĝironumero 382363.